

I. F. E. A.



ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI

Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italia)



Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimelli p. l. Germano

Nº. 6 - 7

Junio kaj Julio 1958

8-a Jarø

Malgranda kroniko de la 10-a Internacia Kongreso de la Fervojistoj-Esper.

Aarhus Danlando de la 10-a ĝis la 16-a de Majo 1958

Grupo da italaĵ Fervojistoj veturis, dum la unuaj tagoj de majo, al Aarhus, en Danlando; por reprezenti, al la 10-a Kongreso de la Esperantistoj-Fervojistoj, nia kategorio, por libere partopreni en medio de vera frateco varmigita per la komuna lingvo, al la diskutoj pri la laboro, la vivo, kaj la kulturo de la Fervojistoj de la tuta Eŭropo, ĉar ĉiuj, aŭ preskaŭ, la Eŭropaj Landoj, sendis tie reprezentantojn.

En la stacidomo de Hamburg, ni havis la impreson alproksimigi Esperantujon, nome al la lando de la Esperantistoj. Fakte, sur la kajo, dum la atendo de la trajno al Danlando, ni renkontis multegajn eksterlandajn amikojn aŭ konatulojn, irantajn, kiel ni, al Aarhus.

Unuan ĝojan surprizon ni havis, vidi apartan vagonon, rezervitan al la Esperantistoj-Fervojistoj irantaj al la kongreso; duan surprizon ni havis en Padborg - unua Dana stacidomo - kie la laŭtparolilo al ni donis festan bonvenon en esperanta lingvo, kaj trofeoj de Danaĵ kaj Esperantaj flagoj, okuladis el ĉiuj flankoj de la stacidomo. La danaĵ kolegoj, tuj al nia dispono je la alveno en la Aarhusa stacidomo, kondukis nin tra la Urbo, al la hoteloj al ni destinitataj.

Aero de festo, de gaja amikeco, aŭ pli bone, de homa frateco, ĉeestis vespere, en la vasta salono de la kongresejo, kie kolegoj renkontis kolegojn novaj amikecoj naskiĝis, oni plektis longajn paroladojn kaj oni memoris forestantajn amikojn. Sur la muroj pendis grandaj insignoj de ĉiuj antaŭaj kongresoj kiuj memoriĝis belajn travivaĵojn.

Dimanĉon 11-a de majo, en la mirinda kaj tre moderna salonego de la Urbodomo, okazis la solena inaŭguro de la kongreso ĝojigita per la muziko de la Orkestro de la Aarhusaj fervojistoj. La manifestacio, komencita per la bonvena parolado de la Prezidanto de la Organiza Komitato S-ro Kensing, daŭris per la salutvortoj de la Honoraj Gastoj.

Umue salutis, en esperanta lingvo, la Ministro pri la Danaĵ Internaj Aferoj S-ro Søren Olesen - Protektanto de la Kongreso, en la nomo de la Dana Registaro. Poste daŭrigis, esperante, la salutvortoj de la Vicurbestro S-ro Bernhardt Jensen en la nomo de la Urbo Aarhus; de la Ĝenerala Direktoro de la Danaĵ Fervojoj; S-ro Pen Skov, kiu alportis al la kongresanoj la saluton de la D.S.B. Administracio; de la Prezidanto de la sportaj, artaj kaj kulturaj societoj de la Danaĵ Fervojistoj; la Prezidanto de la loka Esperanto-Grupo S-ro Piirgaard en la nomo de la Centra Dana Esperantista Ligo; de la Prezidanto de la Dana Laborista Esperantista Asocio S-ro Holger Hansen. Noton de ĝentileco kaj folkloro kunportis la japana ĵurnalistino F-ino Joŝiko Kajino, kiu, vestita de la karakteriza kimono,

supreniris la oratoran podion por prezenti al la ĉeestantoj la saluton kaj la bondezirojn de la Japanaj Esperantistoj.

Salutis poste la Kongreson, S-ro Hugo Steiner je la nomo de la Aŭstria Federaciaj Fervojoj kaj de ilia Ĝenerala Direktoro; nederlanda S-ro Labordus en la nomo de la transporta entrepreno Van Gend, flankentrepreno de la Ŝtataj Nederlandaj Fervojoj; S-ro Gosta Bolander en la nomo de la Ŝtataj Svedaj Fervojoj; S-ro Oskar Kovacic en la nomo de la Aŭstria Fervojista Sindikato, kaj S-ro Ragnar je la nomo de la Sveda Fervojista Sindikato.

Poste mallonge parolis la Delegitoj de la landaj partoprenantoj al la Kongreso:

Aŭstrio	Kolego Tschom	Jugoslavio	Kolego Hencic
Danlando	" Thorsted	Nederlando	" Hoogendijk
Finnlando	" Ruhainainen	Norvegio	" Lund
Francio	Kolegino Lemonnier	Skotlando	" Scott
Germanio	Kolego Giessner	Svedio	" Olsson
Italio	" Gimelli	Svisio	" Sandmeier
Hispanio	" Gimenez		

La Bulgara, Angla, Pola kaj Hungara Delegitoj, kiuj antaŭe anoncis sian alvenon, ne ĉeestis. Permis la solenan inaŭguron de la kongreso longa kaj vibranta parolado de S-ro W. Stapel, Prezidanto de la Internacia Federacio de la Esperantistaj Fervojistoj.

Post la eliro, la kongresanoj haltis kaj kunigis sur la ŝtuparon de la Urbodomo por la tradicia fotografado.

Posttagmeze, post unua kontakto de la Delegitoj, en diversaj aŭtobusoj, ni faris la rondon de la Urbo kaj ĉirkaŭaĵoj, vidante la pli belajn verkojn, admirate la densajn arbarojn kiu ĝin ĉirkaŭas kaj la vastan havenon, dum la esperanta gvidanto ilustris al ni ĝian karakterizaĵojn.

Dum la tagoj lundo, mardo kaj merkredo evolvis la laborkunsidoj; en ili oni traktadis, krom organizajn, financajn kaj kategoriajn temojn, la antaŭfiksitajn temojn pri purigado kaj revizio de la veturiloj en la diversaj Ŝtataj Fervojoj, ek de la revizio de la lokomotivoj al la purigadoj de la vagonoj kaj de la pasager vagonoj. La fakprelego de S-ro Burger estis interesa kaj instrua. Laste oni antaŭfiksis la diskutajn temojn por la proksima kongreso, kiu okazos en la venonta majo en Linz (Aŭstrio), nome "La evoluo de la horaro".

Pli bone ol antaŭe estis la kunveno de la Terminara Komitato, danke al la gvidanto S-ro Ritterspach kaj al ĝia ĉefino.

Grava punkto estis la estrarsaĝo. Eksiĝis Prezidanto S-ro Stapel, kasisto S-ro Biesheuvel kaj asesoro S-ro Drijfhout; kiuj aplaŭde estis elektitaj Honoraj Prezidanto kaj Membroj de I.F.E.F. Nova Prezidanto fariĝis kolego De Jong, kasisto Oosterwijk kaj dua sekretario Poptie. S-ro Hoen transprenos la redaktoran taskon.

Dum la laboroj, por sinjorinoj kaj fraŭlinoj, estis organizitaj vizitoj al fabrikoj, lernejoj kaj diversaj magazenoj k.t.p.

Lundon, vespere, en la luksa salono de la Urbodomo, treege lumigita kaj ornamita per floroj kaj esperantaj flagoj, okazis muzikvespero kun la partopreno de la fama dana operkantistino Gerda Gilboe kaj de la violonvirtuozo Wandy Tworek, kiun kelkaj inter ni, jam admiris televide dum eŭropelsendo el Bruselo. La vesperfesto priatraktis ĉefe la kantaton "Verda Semaforo" Esperante verkitan okaze de la kongreso, per la dana poeto Poul Thorsen kun muziko de la majstro E. Ankerstjerne. Solistoj de la Kantato estis Gerda Gilboe kaj Miskow Makwarth akompanitaj per la orkestro direktita de la aŭtoro, kaj la ĥoro "Fervojistoj 1910".

Mardon okazis arta vesperfestado dum kiu kelkaj fervojistoj prezentis kantistojn kaj muzikistojn kaj tre lertan junulon kiu per helpo de la solaj fingroj sciis ludi dolĉajn melodiojn, el orkestro komponita el akvoplenaj glasoj, de diver-

saj mezuroj. Merkredon, vespere, estis prezentitaj, esperante komentataj, filmoj de turismaj kaj fervojaj temoj pri Danlando kaj Islando. Ĵaŭdon, ekskurso tra Jutlando, kondukis la kongresanojn, sur aparta vagonaro, al la fjordo de Ringkjøbing kaj de ĉi tie, sur komfortaj aŭtobusoj, tra stranga pejzaĝo de altaj dunoj, al Hvide Sande (kie la kluzo regulas la fluon de la akvoj el la fjordo de Ringkjøbing) en kies haveno ŝnurligitaj la fiŝkaptboatoj, kiuj formas la imponan ŝiparon de la Norda Maro.

Vendredon, en diversaj grupoj, kun danaj esperantistaj akompanantoj, ni vizitis la uzinon de grandaj riparejoj de la Danaj Fervojoj en Aarhus, kiu estas la dua Urbo de Danlando, pro graŝdeco kaj nombro da loĝantoj. Vespere, en Fribhedem, luksa ejo situanta en la ĝardeno apud la Zoo, okazis internacia balo kaj fermo de la kongreso kaj la salutvortoj konfuziĝis kun la kredo de la artfajraĵoj kiuj elirigis nin eksteren.

Ni varme dankas al Prezidanto de la L.K.K. S-ro Kensing kaj liaj helpantoj por la bonega organizado de tiu ĉi sukcesplena kaj bela kongreso.

Aldone al la kongreso estis vizito al la ĉefurbo Kopenhago, kie ni veturis multnombraj, afable akceptitaj de la lokaj Esperantistoj kiuj konigis al ni la Urbon kaj tiun ludan kaj ĝojigan parko kiu estis "Tivoli"

Ginelli Germano

29-a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

PALERMO -23-27 Aŭgusto 1958

Inter la urboj de Sicilio brilas, sankiel belega perlo, Palermo en la ne ordinara riĉeco de siaj naturaj belecoj kaj admirindaj monumentoj, en la specialaj esprimoj de sia folkloro kaj en la rimarkinda allogaĵo de siaj internaciaj manifestacioj.

Honora Komitato

L.EM.M.Kard. Ernesto RUFFINI Ĉefepiskopo de Palermo

L.Eksc.M.Prof. MATTARELLA Bernardo Ŝtata Ministro por la telekomunikadoj

L.Eksc.M.Prof. LA LOGGIA Giuseppe Prezidanto de la Sicilia Regiono

Organiza Komitato

ABATE Dokt. Rosario - Prezidanto de la Esperanto Grupo de Palermo - Prezidanto

BOSCARINO Adv. Giuseppe Stanislao - Delegito de la Itala Esperanto Federacio por Sicilio - Vicprezidanto

S-ro RIOTTA Giuseppe - Sekretario

PROGRAMO

Sabato 23 Aŭgusto 1958

Akceptado de la Kongresanoj en la haveno kaj en la fervoja centra stacidomo.

h. 20 - Interkona vespero ĉe la "Circolo della Stampa" (Teatro Massimo).

Dimanĉo 24 Aŭgusto 1958

h. 8,30 - Katolika Diservo, laŭ la greka rito, en la Preĝejo "La Martorana".

h. 10 - Solena malfermo de la Kongreso (Politeama Garibaldi).

h. 12 - Komuna fotografado (ŝtuparo de la Teatro Massimo).

h. 15,30 - 8-a Kongreso de la Itala Fervojista Esperanto-Asocio (I.F.E.A.) (Saloneto de la Circolo della Stampa).

h. 18 - Folkloro manifestacio en Monreale.

h. 20 - Folkloro distra vespero kaj dancoj (Villa Igea).

Lundon 25 Aŭgusto 1958

h. 8 - Itala Instituto de Esperanto: skribaj ekzamenoj.

h. 10 - Ĝenerala kunsido de Itala Esperanto Federacio.

h. 12 - Akcepto ĉe la Urbestro de Palermo.

h. 15 - Itala Instituto de Esperanto: kunsido de la ĝenerala konsilantaro.

h. 17 - Vizito de la Urbo per aŭtobusoj. h. 20 - Skribaj ekzamenoj.

Mardon 26 Aŭgusto 1958

- h. 8,30 - Jara nacia kunveno de Katolikaj Esperantistoj (U.E.C.I.).
- h. 10 - Daŭrigo de la kongresaj laboroj kaj fermo de la Kongreso (Politeama)
- h. 16 - Itala Instituto de Esperanto: voĉaj ekzamenoj.
- h. 20 - Folkloraj spektakloj: popolaj siciliaj pupoj-kantoj de la junularo de la Grupoj de Sciacca kaj de Palermo (Circolo della Stampa).

Merkredon 27 Aŭgusto 1958

Tuttaga ekskurso tra la ravplena "Conca d'oro". Akcepto de la Urbestro de Monreale. Vizito al la fama Preĝejo. Komuna tagmanĝo. Reveno al Palermo.

INTERESAJ INFORMOJ: Rabatoj:

Surŝipe de Napoli al Palermo kaj ree: rabato 25%. Nura iro aŭ nura reveno 10%: acetante la bileton, montru la kongreskarton. Antaŭmendoj skribu al Soc. Navigazione Tirrenia Via Bissolati, 47 Roma. La marbileto de iro kaj reiro validas 30 tagojn.

Filateloloj

Dimanĉon kaj lundon okazos interesa filatela manifestacio organizata de la "Associazione Italiana Filatelici Costruttivi". Oni ekspozicios la esperantajjn p.m., ĝis nun aperitajn. Estas acetebila la serio de 18 p.k. pri la Esperantaj p.m. (prezo: italaj liroj 600 plus sendelspezoj).

En la Kongresejo funkcios speciala poŝtoŝtampo por la memoriga ŝtampo de la p.m. Estas acetebila la memoriga p.k. de la Kongreso (liroj 50 plus sedelspezoj)

Loĝejoj:

Petu informojn al la Organiza Komitato. Junulargastejo estas je dispo de junaj gekongresanoj: tranokto 250 liroj tuttaga pensiona 1000 liroj.

ATENTU! Eksterlandaj gesamideanoj ne pagos aligkotizon.

ADRESO: Comitato Organizzatore del 29° Congresso Italiano di Esperanto - Via Tripoli, 15 presso Abate - Palermo. POSTGIRKONTO: N° 7-6486 Abate Rosario

TELEFONO: 71393

43-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MAINZ (Germanujo) de la 2-a ĝis la 9-a de Aŭgusto 1958

N-roj 7-kaj 8 OFICIALAJ KOMUNIKOJ Majo kaj Aprilo 1958

Nova Karavano: Centra Dana Esperantista Ligo agnoskas la karavano de S-ro S.K. Nielsen, Havopladsvej 129, Fredericia, Danlando

Novaj Fakkunvenoj: Anoncas fakkunvenon:

- Esperanta Ŝak-Ligo Internacia, D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo.
- Veterana Esperantista Ligo; diskuttemo "Frujaroj de nia Movado"
- Internacia Scienca Asocio Esperantista, Prof. Boj. Popoviĉ, Zagrebĉka 18, Sarajevo, Jugoslavio.
- Esperanta-Sekcio de la Nacia Spiritita Konsilantaro de Bahaoj pri "Bahaa Mondreligio: kial ni bezonas ĝin?". Adreso: S-ro Voldemaro von der Ley, Ulrichstr. 18, Taifinger-Wirtt.
- Internacia Verkista Asocio. Adreso: S-ro W. Auld, Knockfarril, Thownside Road, Johnstone, Renfr., Britujo.
- Studenta Tutmonda Esperantista Ligookazigos fondkunvenon dum la U.K. Adreso: S-ro Sven Ziegler, Bjørnedevej 62, Kopenhago Brh. Danlando.

E.S.U.: Prof. Gaston Waringhien prelegos pri "Honriko Heine.

Muzika Vespero: La ĉoka Kongresa Komitato decidis okazigi dum la Kongreso Muzikan Vesperon kun ĉielarka prezento de klasika kaj moderna muziko kun koncertaj kantoj en Esperanto.

Gazetara Servo: La Kongresa Gazetara Servo komencis en marto la periodan dissendadon de informoj al germanaj kaj eksterlandaj gazetoj. La nekongreslandaj esperantistoj estas petataj sendi al la Kongreso eltondaĵojn de gazetartikoloj pri la Universala Kongreso en Mainz.

Honora Protektanto: D-ro h.c. Peter Altmeyer, Ministro-Prezidanto de Rejnlando-Palatinato akceptis esti la protektanto de la Universala Kongreso.

Faka vizito: Limigita nombro da esperantistaj fervojistoj rajtos viziti la signalrigardejon en la ĉefstacidomo de Frankfurto, la plej modernan en Eŭropo.

Fervojista kunveno: Internacia Fervojista Esperantista Federacio okazigos, en la kadro de la Kongreso, publikan kunvenon kun referaĵo pri "Raciigado-Modernigado-Aŭtomatigado de la Germana Federacia Fervojo". La nefervojistoj estas invitataj.

Flagoj: 135 germanaj urboj decidis disponigi al Mainz siajn flagojn por feste ornami la stratojn honore al la Universala Kongreso.

Statistiko: (ĝis la fino de aprilo) Algerio 2, Aŭstrujo 26, Belgujo 26, Brazilo 6, Britujo 148, Bulgarujo 11, Ĉeĥoslovakujo 1, Danlando 85, Etiopio 1, Finnlando 14, Francujo 296, Germanujo 507, Grekujo 2, Hispanujo 15, Hungarujo 6, Islando 6, Israelo 1, Italujo 73, Japanujo 2, Jugoslavio 48, Maroko 7, Meksiko 1, Monako 3, Nederlando 105, Norvegujo 27, Novzelando 4, Pollando 9, Portugalujo 2, Sudafriko 1, Svedujo 120, Svisujo 38, Uragvajo 1, Usono 10, Venezuelo 2, Sovetunio 2. Entute 1609 el 34 landoj (pasintjare 1025 el 35 landoj).

G.C. Fighiera - Konstanta Kongresa Sekretario

A T E N T U I

G R A V A S C I L G O I

A T E N T U I

Dum la 43-a Universala Kongreso en Mainz flanko de I.F.E.F. estos aranĝata aparta fakkunveno fervojista. Ĝi okazos merkredon la 6-an de aŭgusto je la 14-a horo en la kongresejo. Daŭro proksimume 1 horo. Dum la kunveno estos prelegata grava kaj interesega publikajo, verkita de Prezidanto Geitmann, unu el la kvar membroj de la estraro de la Germana Federacia Fervojo. La temo estos "Raciigado-Modernigado-Aŭtomatigado de la Germana Federacia Fervojo". Ĉar ĝi estas ĝenerale interesa, ankaŭ niuj nefervojistaj kongresanoj estas invitataj kaj bonvenaj.

La saman tagon antaŭtagmeze estos vizitata (nefervojistoj ne rajtos) la en Eŭropo plej granda kaj moderna elektra centralregadejo en Frankfurt/M Hbf., delikata frandaĵo por fervojistoj ĉiuspecaj. Komuna ekveturo 7,50 h. de Mainz Hbf. komuna reveturo 11,26 h. de Frankfurt Hbf. Helpe de tiu regadejo la tuta trafiko en kaj ĉirkaŭ Frankfurt estas dirigata. Ĉar la nombro de partoprenantoj estos limigata, ni rekomendas, jam nun skribi aŭ telefone anonci la intencon de ĉeesto al la G.E.F.A.-sekretariino, S-ino E. Kruse, Sozialamt Frankfurt M. Basa 2204. Kompreneble ankaŭ tiaj eksterlandaj kaj germanaj gekolegoj rajtos partopreni, kiuj ne povas ĉeesti la kongreson mem, sed nur havos tempon, veni al Mainz dum unu aŭ du tagoj. Ni tamen atentigas, ke la vizitantoj de la regadejo estas petataj, nepre ĉeesti la posttagmezan fakkunsidon en Mainz. Ni povos, havigi al ni komunan liberbiletan por veturadoj inter Mainz kaj Frankfurt. Bonvolu atenti, ke G.E.F.A. nepre ne povos zorgi pri tranoktoj.

Gekolegoj! Venu multnombre kaj demonstraciuj la forton de nia fakmovado kaj la taŭgecon de nia lingvo sur faka tereno. Vi ne estos seniluziigataj.

La Prezidanto de la Germana Esperanta Fervojista Asocio

ESPERANTA GVIDLIBRO DE LA URBO RAVENNA

Gli amici del Gruppo Esperantista di Ravenna, dopo il bel Informilo "Ravenna Bulteno" apparso in Aprile, hanno dato un nuovo segno della loro attività dal suddetto Informilo n° 3 di Giugno-Luglio 1958 prendiamo:

"Nia Grupo ĵus eldonis 32-an pagan bele ilustritan Esperantan Gvidlibron por disdoni Urban Ravenna inter la Esperantistoj. Tradukis la tekston Pastro M. Carolfi. Oni povas senpage ricevi la gvidlibron mendante ĝin per simpla poŝtkarto al nia Grupo (Piazza Anita 1 Ravenna Italujo) aŭ al la "Azienda Autonoma di Soggiorno e Turismo-Ravenna. Kiu povas sendi esperantaĵojn, ĉeĵajn bildkartojn ĉiĉe afrankitajn, revuojn, librojn kaj aliajn eldonaĵojn, ĉar ni intencas aranĝi ekspozicion kaj bibliotekon.

RADIO ROMA - ESPERANTO PAKO - Casella Postale 320 - ROMA (Italia)

DISSEŬDOJ EN ESPERANTO - Jaro 1958-an

La dissendoj okazas de h. 18,55 ĝis h. 19,10 (M.E.T.) Ondlongoj: metroj 30,90 -

Mp/s. 9,71 - metroj 41,24 = Mc/s. 7,27 - metroj 50,34 = Mc/s. 5,96

Prelegantoj: marde: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA

merkrede: S-ro Luigi MINNAJA - vendrede: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA

JULIO 1958 - an

- 928 mardon la 1-an: Italaj kanzonoj en Esperanto
- 929 merkredon la 2-an: Kuriero de Esperanto
- 930 vendredon la 4-an: Italuloj kaj fremdaj verkistoj: Wilhelm von Humboldt
- 931 mardon la 8-an: Italaj regionoj: Emilio
- 932 merkredon la 9-an: Kuriero de Esperanto
- 933 vendredon la 11-an: Leterkesto kaj bibliografio
- 934 mardon la 15-an: Italaj kanzonoj en Esperanto
- 935 merkredon la 16-an: Kuriero de Esperanto
- 936 vendredon la 18-an: Novaĵoj el Italujo
- 937 mardon la 22-an: Tra Romo: Piazza di Spagna kaj Trinità dei Monti
- 938 merkredon la 23-an: Kuriero de Esperanto
- 939 vendredon la 25-an: Ekskursoj de la 29-a Itala Esperanto-Kongreso
- 940 mardon la 29-an: Fanaj lirikaj kantistinoj de la pasinta jaro: Adelina Patti
- 941 merkredon la 30-an: Kuriero de Esperanto

AUGUSTO 1958 - an

- 942 vendredon la 1-an: Italaj komponistoj: Pietro Mascagni
- 943 mardon la 5-an: Tra la literaturo
- 944 merkredon la 6-an: Kuriero de Esperanto
- 945 vendredon la 8-an: Romaj ĉefbaziliko: Sankta Maria la Granda
- 946 mardon la 12-an: Leterkesto kaj bibliografio
- 947 merkredon la 13-an: Kuriero de Esperanto
- 948 vendredon la 15-an: Augustaj ferioj tra la Romaj Kasteloj
- 949 mardon la 19-an: Italaj kanzonoj en Esperanto
- 950 merkredon la 20-an: Kuriero de Esperanto
- 951 vendredon la 22-an: Novaĵoj el Italujo
- 952 mardon la 26-an: La grandaj Sanktuloj: Sankta Augusteno
- 953 merkredon la 27-an: Kuriero de Esperanto
- 954 vendredon la 29-an: Italaj regionoj: Trentlando

La Faktestro: L. MINNAJA

La Aŭstria Fervojo eldonis prospekton en Esperanto

Jus aperis bela ilustrita broŝuro en la lingvo Esperanto, eldonita de la Aŭstria Federacia Fervojo sub la titolo "Per la Fervojo tra Aŭstrio". La prospekto enhavas kron informajn tekstojn kaj belajn bildojn ankaŭ skize desegnitajn planojn de la ĉefaj fervojlinioj. La broŝuro estas ricevebla kontraŭ unu respondekopon de: Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Wien I, Aŭstrio.

GRAVAJ ABANDĜOJ EN WIENO DUM JUNIO 1958-an

- 1- 27-a I.K.U.E.-Kongreso okazos en Wien 25-31 julio 1958 (Adreso: Walter MUDRAK, WIEN III, Beatrixgasse 19/9)
- 2- INAUGURO DE ZAMENHOF-MONUMENTO en la centro de Wien la 27-a de julio 1958
- 3- Feriosenajno (25-31 julio 1958) por ebligi al la partoprenantoj en la aranĝoj 1 kaj 2 malmultekostan restadon en Wien dum 6 tagoj por nur aŭstriaĵaj ĉilingoj 450 ŝio en kalkulita kiel noktado, manĝoj, ekskursoj, entreprenoj k.t.p. (Adreso por 2 kaj 3 al I.E.M.W., Hofburg, WIEN I Aŭstrio).